Universala Esperanto-Asocio

**EKO UKO**

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko: EKO 2016-22 sendita el Nitra (Slovakio), la 31an de julio. EKO-UKO numero 2*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

## Malkutimaj prioritatoj en la Komitato

La Komitato de UEA akceptis dekon de modifoj al la Asocia Statuto kaj pluiris al la enkonduko pri la regularo de TEJO (aprobita vendrede) kaj la Statuto de TEJO, kiu interalie proponas la levon de la aĝlimo de 29 ĝis 35, kaj kunlaboran kontrakton inter TEJO kaj UEA. Tiu triopo da dokumentoj estas akceptitaj. Laŝanĝoj en la Statuto de UEA pluiros al baldaŭa Ĝenerala Voĉdono de la membraro. La Komitato aldonis tri pliajn C-komitatanojn (Osmo Buller, Nico Huurman kaj Fernando Maia Jr.) al tiuj jam elektitaj frue en la semajno: Ili nomumis la novan konsiston por la Komisiono pri Financo kaj Administrado (KFA): Osmo Buller, Huang Yinbao (Trezoro), Nico Huurman kaj Fernando Maia. La venonta fizika kunsido de la Komitato okazos en Seulo sabaton, la 22an de julio 2017 je 14.00h.

La etosplena fermo okazis sabate, raportoj pri tio estas sendube aliloke akireblaj.



Post la fermo de UK la estraroj de UEA restis por kunsidi tra pliaj tagoj. Tiu de UEA kunsidis dum naŭ horoj tra du tagoj, du el tiuj kune kun la estraro kaj volontuloj de TEJO. Inter la komunaj temoj: Eksteraj rilatoj, Subvenciserĉado, akceptitaj subvenciataj projektoj, IJK en Afriko en 2017, kunlaboro kun regionaj komisionoj de UEA kaj la landa agado de TEJO.




La premio Onisaburo Deguĉi estis aljuĝita al Mirejo Grosjean pro multjara agado konforme kun la celaro de la premio. Post la transdono farita de Mark Fettes kaj Lee Jungkee. Foto: Marija Beloševiĉ (ĉiuj aliaj:smg)




LKK-anoj kaj helpantoj sur la podio rikoltis tumultan aplaŭdon por la laborado por sukcesigi la kongreson.







Supre,sube: amasan fotadon ricevis la kantprezento de la infanoj kaj gvidintoj el la Infana Kongreseto.




Fotoj el la estrarkunsido kaj aliaj partoj de la kongreso sekvos en posta komuniko.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Se vi volas vidi pli malnovajn komunikojn iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF kreita de Nuance Power PDF.